Jaro III/VII. N-o 11 (35) Aŭgusto 1926

Sennacieca Revuo

Monata Organo
de Sennacieca Asocio Tutmonda
FONDITA EN 1919

Literaturo - Scienco - Pedagogio

ENHAVO:

N. N. Ŝapovalenko : Urbo sur ostaro. Trad. *Nik. Vosarken*. — *A. S. Puŝkin* : Fondo de Peterburgo. Trad. *N. V. Nekrasov*. — *N. Gogol* : Nevski-Prospekto. Trad. *Ged*. — *Andreo Belyj* : Peterburgo 1905. Trad. *N. Nevein*. — *V. Aleksandrovskij* : Ribelo. Trad. *G. Rozenblat* †. — *V. Ĥolodkovski* : Malnova Peterburgo kaj Nova Leningrado. Trad. *Voldemaro*. — *R. Ivnev* : Peterburgo. Trad. *N. V.* — *I. E.* : Leningrado. Trad. *N. Vladimirovič*. — *G. Ciperović* : Estonteco de Leningrado. Trad. *V. Duno*.

Redakcio : 1-a Tverskaja-Jamskaja, 35, kv. 5, Moskvo I (USSR)
Administracio: Rich. Lerchner, Colmstr. 1, Leipzig O 27 (Germ.)

REDAKCIA ANGULO

Jes, malica rideto nin ŝutas per malvarma sarkasmo :

Vi, nomantaj vin sennaciuloj, ekiris la vojeton de ĉiuj esperanto-gazetoj — la vojeton famigi iun urbon, la vojeton de belaj fotoj kaj tedaj priskriboj. Malgraŭ viaj sinŝajnigoj sennaciecaj vi uzas la okazon por fanfaroni pri la kongres-urbo, eble nur tial, ke ĝi situas en via loĝlando. Kontraŭbatalante patriotismon, vi konservis la primitivan staton ĝian — la urb-patriotismon. Ne malproksimas de ĝi la land-patriotismo...

Eble, vi pravas, la malica ridetanto... Eble, vi pravas : ni pekas hodiaŭ per *kongresa « Leningrada » kajero de nia revuo.*

Sed nur eble, ĉar la fotoj de l' urbo ornamas la kajeron ne kun la celo invite logi vin en la kongresurbon — ilia belo rakontas pri alio : pri la ŝvito, pri la sanga ŝvito de tiuj, per kies manoj ĝi estis konstruita, sur kies dorsoj estis portataj la ŝtonoj por ĝi.

Ĝi portis multajn nomojn... Jen — Sankt-Piter-Burĥ, transformiĝinta en pli regule formitan Sankt-Peterburg. Dum-milita ŝovinisma ondo ĝin alinomas je Petrograd. La revolucio kaj la funebro pri la revoluci-gvidinto — je Leningrad. Ĉu vivos ni mem, aŭ niaj infanoj, aŭ niaj nepoj — kiam ĝi fariĝos Leninurbo ?

Sed la nomoj — ili spegulas nur la historiajn etapojn. Kaj sur la paĝoj de nia kajero en literaturaj fragmentoj trapasas ĉi etapoj de la historio.

Jen la homoj estas pelataj sur marĉojn por konstrui pro ies deziro la urbegon sur ĉi marĉoj. Dum ducent jaroj la urbo kreskas, belornamas sin per ŝtonaj konstruaĵoj. Sed inter ĉi ŝtonaj belaĵoj daŭre vivas la marĉo de carisma Rusio — servuta, subjuga, oficista, — la Rusio, sin ekspozicianta sur « Nevski-Prospekto » de N. Gogol.

Necesis do la tagoj oktobraj, necesis do la kanonpafoj

(Daŭrigon vidu sur 3-a paĝo de la kovrilo.)



URBO SUR OSTARO

FRAGMENTO EL NOVELO

N. N. ŜAPOVALENKO

En 1714 sur malnova Novgoroda vojo paŝis partio da laboristoj, rekrutitaj laŭ la cara ukazo el la tuta Rusio por konstruado de nova urbo — Sankt-Peterburgo.

La vojo estis per branĉaro pavimita trans marĉoj kaj ŝlimoj, ĉirkaŭkreskitaj de netrairebla densaĵo.

Estis printempo. Malpuraj riveroj subakvigis bordojn. Bruis riveretoj. Senlimaj lagoj kovris arbarojn kaj marĉegojn. Super ia ŝvelinta tero ekpendis grizaj nebuloj. Pluvetis.

Apud Tosna-rivero la partiestro, ekskapitano Vasiljev ekkomandis.

— Enviciĝu por la kontrolo!...

Komenciĝis la ordinara nomvokado antaŭ la vespera halto. La eskortistoj per bastonoj kunpelis la postrestintojn. La laboraj homoj tremis pro malvarmo. Ili sin kuntiris en ĉifonaj kiteloj, klakis per la nudaj piedoj sur la koto.

Ree multaj ne evidentiĝis persone: du mortis dumtage pro malsato kaj malsano, unu dronis dum vado trans sennoma rivero, tri forkuris.

— Ĉu vi scias, hundidoj, — kriis ekskapitano Vasiljev, — ke laŭ la cara ukazo ĉiu el vi respondas por ĉiuj?! Por unu forkurinto — ĉiuj punon akcepti devas. Ĉu vi bone plenumas la volon de la regnestro? Vi mem malsanojn ŝajnigas. Apenaŭ mi flanken rigardas, en arbaron vi celas forsalti. Ĉu en feraĵoj vi ekdeziris iri? Ĉu la dorsoj pri skurĝoj ekenuis? Ĉu sur branĉegoj vi ne pendis?

Li longe minacis, insultis. Poste li starigis gardistojn kaj ekgrimpis en vintrodometon — malaltan, kurbiĝintan alflanke trabaĵon, kovritan per tero.

La laboristoj komencis aranĝi sin por noktado. La multaj tuj ekdormis rekte sur la vojo. La aliaj blovis fajron. La kelkaj sidis senmove, duonvivaj, turmentitaj de la febro.

Venis la nokto, malklare griza, travidebla, simila al tago. Iu ĝemis kaj blasfemis. En arbaro, post marĉo kriis strigo.

Apud ekstrema brullignaro oni boligis akvon.

Pli proksime al la fajro staris surgenue Johano Poriĥalov. En lia juna terkolora vizaĝo febre brulis la okuloj. Apud li malgaja maljunulo kun longa griza barbo. Lian nomon neniu sciis. Li ne estis servutulo kaj aliĝis la partion dumvoje. Pli malproksime kuŝis kozako Dioniso Ĥoĥlaĉ kun Joĉjo Seslavin. Post ili lokis sin: Urbano Artamono Kulikov, eksskribisto Velmireĉenskij, bienano Bazilo Saveljev, invalido-soldato sen brako kaj ankoraŭ du kamparanoj.

Sur la tero kuŝis ĉarpentiloj, hakiloj, diversa havaĵaro.

— Ĉu, fratuloj, — demandis Johano Poriĥalov, — eble scias iu, ĉu multe ankoraŭ necesas iri?

Vi havos tempon mortaĉi, — tragrumblis Seslavin.

La soldato-invalido ekskuis la kapon.

— Nun jam proksime, karulo. Certe mi diras. La ĉitiean landon mi konas. Kun la caro tra ĝi kontraŭ la svedoj mi iris.

— Ne timu, ekridis la kozako. — Morgaŭ vi ĝisiros, se la forton vi akiros.

— Oh! Tempoj kruelaj. Pereo venis, — plendis la eksskribisto. — Kruroj niaj foriĝis. Ventro mia ŝvelis. Senforta kaj malsata mi estas.

— Rikanu! — minacetis Seslavin.

Johano ŝovis al la eksskribisto pecon da pano.

— Jen! Prenu. Mi toleros iom.

— Eh, malsaĝa vi estas, junulo! — svingis la manon Ĥoĥlaĉ. — Li havas, kredeble, en la sako pli da pano ol ni. Ŝparis li, knabo, por nigra tago. Ha-ha-ha!

La eksskribisto aŭskultis kaj manĝis.

Bazilo Saveljev ektusis.

— Trenas ili, kanajloj, la popolon kamparanan por kio, nekonate. Post milojn da verstoj oni pelas al Pitiburh (1). Al Azov (2) oni pelis ankaŭ same. Por fosi kanalojn ĉe Ladoga. Al regnaj uzinoj. Verŝajne, nun oni centojn da ili konstruis. Al Ingermanlando oni sendis, al Zatono, al Tagan-Rog. En la vilaĝoj neniu restis, kvazaŭ post epidemio: nek ŝtonisto, nek brikisto, nek ĉarpentisto, nek forĝisto. Plena detruo. Lumajn tagojn ni ne vidas. Impostoj kaj tributoj. Ne nur laŭterpecaj, aŭ popersonaj, sed ankaŭ ĉevalaj, palisaraj, po-

---

(1) Kripligita — Peterburg.
(2) Dum milito kontraŭ Turkio.

klaftaj, porpontaj, abelaj, banejaj, ledaj, falĉaj... Fu! Ne memoreble. La homojn oni vendas, kvazaŭ brutojn, dise. Revizioj, alveturoj kaj forveturoj. Komence al milito la caro prenis la kamparanojn, nun la restintajn al marĉo li pelas, — por urbon al li konstrui.

— Vampiro! — diris Joĉjo Seslavin. — La tutan popolon li formanĝis. Por li sola ne sufiĉas donado. Nur pereigas li la bonajn kapojn.

— Kion vi mem permesas? — interrompis Dioniso Ĥoĥlaĉ, skuinte la harojn. — Dece estas. Dezirate estas ŝajne servi kvazaŭ bruto jungita. Rigardu ĉe ni, ĉe Don-rivero, oni iris kun Stepano Razin (1). Ni iru ankoraŭ. Estos amuzo por la nobeloj, por la oficuloj, kaj por la bienuloj! Nur estu homo por levi ĉiujn. E-eh! Promenos ni bonege!

— Alte vi forflugis, karulo, — rimarkigis la soldato, — la kolon ne rompu...

Johano Poriĥalov sidis kaj atente aŭskultis. Ĉiuj ĉi rakontoj pri granda mizeriĝo kaj suferado de la popolo profunde trafis lian animon. Ŝajnis, ke ĝemas la tero mem. Kaj la pensoj turmentaj ĉiam pli forte agitis Johanon.

— Mi ne komprenas, — diris li, utiliginte komenciĝintan silenton, — por kio en tia pereiga loko la caro decidis urbon konstrui?

— Ruza afero, fileto, — diris la maljunulo, — ruzega!

— Komerci li volas, — sencoplene rimarkigis Artamono Kulikov. — Por la komercaj homoj nun estas libereco. Baldaŭ ĉiuj ni sub ilian jungon trafos, estimataj vi. Vere, vere!

La maljunulo kliniĝis al Johano kaj kareseme frapis lin sur la ŝultro.

— Se vi volas certe scii, por kio oni la urbon konstruas, tiam aŭskultu. El Moskvo la caro kuras. Jen kio. Timas ja la caro Moskvon. Ĉe mi, li diras, en Peterburgo nenio moskveca estu. Ĉu vi komprenis? Al la germanoj (2) li sin fordonis... Ĉie germanojn li starigis. Kaj ankaŭ la urbon Sankt-Peterburgo li konstruas por pli proksime al la germanaj landoj esti. Sed nur estos por tiu ĉi urbo pereo baldaŭa. Estos Peterburgo malplena!...

Neniu plu volis daŭrigi la interparoladon. Ĉiuj disiris. Ĉe la estingiĝanta fajro restis la maljunulo kaj Johano. Dioniso Ĥoĥlaĉ dormis per fortega dormo...

Subite el nebulo aŭdatingis malproksima krio:

— Sa-avu!...

(1) Gvidinto de granda ribelo en la regiono de la riveroj Dono kaj Volgo, estis ekzekutita en Moskvo.

(2) Tiutempe ĉiujn alilandanojn la slavoj nomis « nemcy » (mutuloj) pro ilia nepovo paroli. Poste tiu vorto restis nur kiel nomo de la germanoj en ĉiuj slavaj lingvoj.

Johano eksaltis sur la piedojn, strečis la aŭskulton. La krio ripetiĝis.

— Mi kuros, avo, — diris Johano kaj ĵetis sin antaŭen. Ies mano kaptis lian piedon.

— Kuri?! Kaptita, malbenitulo, — insultis eldormiĝinta eskortisto. — Ne piedbatu! Ricevos vi bastonaĵon de la kapitano, — tiam vi piedbatos!

Vekiĝu vi! — ŝiriĝis Johano. — Helpi mi volas. Ĉu vi aŭdas, iu krias? Lasu!

La eskortisto strečiĝis.

— Vere iu krias. Sekve, tiu forkuris, diabla vosto.

— Ni iru. Li vokas, — rapidigis Johano.

— Ni iru. Mi lin instruos, anatemo. Ripozon ne donas vi, malbenituloj. Diabloj!

Ili ekkuris en profundon de la nebulo al la voĉo. Baldaŭ Johano devis halti. La piedoj dronis en musko ĝis la genuoj. Necesis moviĝi malrapide. La krio fariĝis pli aŭdebla. Nun en ĝi sonis malespero. Johano preskaŭ sufokiĝis. Malbenoj kaj minacoj de la eskortisto aŭdiĝis malproksime post la dorso. La piedoj pli profonde dronis en la musko. Johano kun peno estis eltiranta ilin el kavoj. Li senfortiĝis.

— Sa-avu! — aŭdiĝis antaŭe.

Ĉifoje Johano ekkonis la voĉon de Seslavin.

— Tenu vin! Proksime! Te-enu vin!

Johano sin ŝiris antaŭen kaj subite eksentis, ke li ne povas sin movi pluen.

Senhelpe li ekrigardis flanke. Ĉirkaŭe estis sterniĝanta muska marĉo kovrita per akvo. Estis plilumiĝanta la ĉielo. La nebulo leviĝis.

Post kelkaj marĉtuberoj en la akvo Johano rimarkis fine Seslavin. Estis videbla lia kurbigita pro la teruro kapo kaj la senhelpe moviĝantaj brakoj. La ŝlimego suĉis lin ĉiam pli profunden en sian abismon. Li jam ne povis krii.

Restis pasi nur kelkajn paŝojn. Johano provis eltiri piedon. Ĝi ne cedis, kvazaŭ iu tenis ĝin de malsupre kaj tiris al si... Malvarma ŝvito elaperis sur lia frunto. Li komprenis, ke li mem trafis en la marĉegon.

Pasia vivsoifo kaptis Johanon. Li furioziĝis. Kolektinte lastajn fortojn, li elsaltis el la terura kavo kaj, forgesinte ĉion en la mondo, li ekkuris returne, saltetante, falante...

Nur kiam la piedoj de Johano eksentis firman teron, — li haltis kaj rekonsciiĝis. Li ekrigardis al la marĉo. Seslavin ne estis plu videbla...

— Hej, kie vi estis, diablo?

Johano ektremis sub ekbato de la eskortisto.

— Iru al la kontrolo!

Sur la vojo moviĝis la laboristoj.

La ekskapitano Vasiljev kriis:

— Ree unu forkuris. Kanajloj! Hundinidoj! Mi vin instruos! Ĉiu kvina estu punbatita. Ĉiuj por unu. Ha-altu! Ĉu vi aŭdas?!

Oni haltis... La kapitano frapis sur la dentojn maldikan kamparanon el Tver. Komenciĝis la ekzekutado. Pro manko de skurĝoj oni batis per bastonoj. La laboristoj senplende, kvazaŭ bestoj, akceptis la batojn. La okuloj de Dioniso Ĥoĥlov kolere rigardis al la kapitano, kvazaŭ volis ekmemori lin por ĉiam.

Trans Tosna-rivero oni transbordiĝis sur pramo. Plu la vojo ekestis pli homplena. Sur flankoj kuŝis hakita lignaro. Montriĝis vilaĝoj kun domoj konstruitaj rusmaniere. Anstataŭ fenestroj nigris truoj kun surmoveblaj tabuletoj. Renkontiĝis taĉmentoj da soldatoj. Ekknaris ĉararoj...

Maldekstre la tuta tero, kiom povis rigardi la okulo, estis kovrita per traboj. Apud la vojo altiĝis amasoj da ŝtonoj kaj makadamo. Dekstre staris domoj, duone konstruitaj, kun ĉevronoj. Du dekoj da kamparanoj ĝis lumbo starante en akvo fosis kanaleton.

— El kie? El Rusio, ĉu?

— Samlandanoj...

La bruo kreskis plu.

— Ne postrestu, hundidoj! — instigis la laboristojn la kapitano Vasiljev. — Mi vergos!

La arbaro maldensiĝis. La vojo kurbiĝis maldekstren. Johano neatendite ekvidis Neva-riveron.

La larĝa, pale griza rivero kun plataj apenaŭ rimarkeblaj bordoj malrapide rulis siajn malvarmajn akvojn. Sur la akvo sterniĝis nebulo. Longrubande, unu post la alia, naĝis pramoj. Sur unu el ili brulis fajroligno. Post la rivero malklare distingiĝis terremparo, kaj post ĝi tegmentoj de domoj. Sopiro estis pro tiu ĉi bildo.

— Nien, — klarigis la soldato. — La svedoj tie ĉi fortikaĵon havis. Ni detruis. Apude estas Oĥta-rivereto. Ne videblas ĝi pro la nebulo. Sur nia flanko estas la vilaĝo Spasskoe. Ankaŭ nun detruita.

— Kaj kie estas Peterburgo? — kun ekscitiĝo demandis Johano.

— Ĝi jen tie estos!

Johano ekrigardis malsupren laŭ la rivero, kien montris la soldato, sed li ekvidis nur grizan muron da nebulo...

Esperantigis Nik. VOSARKEN.



FONDO DE PETERBURGO

Fragmento el « Kupra Rajdanto », Peterburga novelo.

A. S. PUŜKIN (1799-1837).

Ĉe bord' dezerta sur granit'
Li (1) staris, plena de medit',
Kaj fiksrigardis. Kun kvieto
Rivero larĝe fluis ; glit'
Plaŭdetis nur de boateto.
Sur la kotmarĉa, muska bord'
Nigretis kabanar' sen ord' —
Azilo de mizera finno ;
Kaj en nebulo de la nord'
En la mallumo sen difino
Arbaro bruis.
Pensis li :
« Por svedoj estos ĝi minaca ;
Urbego estu tie ĉi,
Por moko je najbar' sagaca.
Natur' al nia montris pov'
Fenestron fari al Eŭrop',
Stariĝi forte ĉe la maro ;
Vizitos nin laŭ nova voj'
La fremdaj flagoj — kaj kun ĝoj'
Festenos ni kun la gastaro. »

Cent jaroj pasis — en solen'
La norda urbo, juna, bela,
El marĉoj kaj arbaroj jen
Ekstaris per sorĉaĵ' fabela :
Sur loko, kie fiŝkaptist',
De la natur' mizera filo,
Antaŭe kaptis kun persist'
Per truiĝinta retkaptilo
En akvoj fremdaj por la fam' —
Nun sur bruantaj bordoj jam
De la palacoj luksaj staras
Regulaj vicoj kun fier' ;
El ĉiuj landoj de la ter'
La ŝipoj tie halton faras ;
De la granita Nev-border'
Ekpendis de la pontoj ĉenoj,
Kaj la verdaĵo de ĝardenoj
Insulojn kovris de l' river'...
. . . .
Mi amas vin, de Petr' afero,
Aspekton vian amas mi,
Solenan fluon de l' rivero,
Graniton de la borda stri',
Ornamojn de bariloj feraj,
Krepuskon molan de l' ĉiel'
En viaj noktoj klarveteraj,
Dum mi en mia ĉambra ĉel'
Sen lumo lampa skribas, legas
Kaj la klarec' sur stratoj regas
Silente, montras sin en hel'
Pint' Admirala sur ĉiel'...
. . . .

El la rusa tradukis N. V. NEKRASOV.

---

(1) *Caro Petro la Granda, fondinto de Sankt-Peterburgo (nun Leningrado).*



NEVSKI-PROSPEKTO

FRAGMENTOJ

N. GOGOL (1809-1852)

Nenio ekzistas pli bona ol Nevski-prospekto, almenaŭ en Peterburgo: por tiu ĉi ĝi faras ĉion... Kia rapida transformiĝo okazas sur ĝi dumdaŭre de unu nur tago! Kiom da ŝanĝoj suferas ĝi dumdaŭre de unu nur tagnokto! Ni komencu de la plej frua mateno, kiam la tuta Peterburgo odoras per varmegaj, ĵus nur bakitaj panoj kaj estas plenigita je maljunulinoj en ŝiritaj roboj kaj peltoj, farantaj siajn veturojn je preĝejoj kaj je kompatemaj preterpasantoj. Tiam Nevski-prospekto estas malplena: korpulentaj magazenposedantoj kaj iliaj komizoj ankoraŭ dormas en siaj holandaj ĉemizoj aŭ sapumas sian noblan vangon kaj trinkas kafon; almozuloj kolektiĝas ĉe la pordoj de konfitejoj, kie dormplena kelnero, fluginta hieraŭ, kiel muŝo, kun ĉokolado, ekrampas kun balailo en la mano, sen koltuko, kaj ĵetas al ili malfreŝajn kukaĵojn kaj manĝrestaĵojn. Tra la stratoj sin trenas bezona popolo: iufoje transiras ĝin rusaj muĵikoj, rapidantaj al laboro, en malpurigitaj per kalko botoj, kiujn eĉ Katarina kanalo, fama pro sia pureco, ne kapablus lavi. Tiutempe por sinjorinoj estas nekonvene marŝi, ĉar rusa popolo ŝatas interparoli per tiaj akraj esprimoj, kiujn ili ne aŭdos eĉ en teatro. Iufoje ĵus-eldorma oficisto sin trenas kun paperujo sub la brako, se tra Nevski-prospekto kuŝas lia vojo al la departamento. Oni decidoplene povas diri, ke dum tiu ĉi tempo, t. e. antaŭ la 12-a horo, Nevski-prospekto por neniu prezentas celon, ĝi prezentas nur rimedon: ĝi po-iom pleniĝas je homoj, havantaj siajn okupojn, siajn zorgojn, siajn ĉagrenojn, sed tute ne pensantaj pri ĝi...

...Je la 12-a horo Nevski prospekto estas atakata de ĉiu-

naciaj guvernistoj kun iliaj edukatoj batist-kolumaj. Anglaj Dĵons'oj kaj francaj Kok'oj marŝas brako ĉe brako kun la konfiditaj al ilia patreca zorgo edukatoj, kaj kun deca gravo klarigas al ili, ke ŝildoj super magazenoj estas farataj nur por ke oni povu pere de ili ekscii, kio troviĝas en la magazenoj mem. Guvernistinoj, palaj anglinoj kaj rozkoloraj francinoj, marŝas majestece malantaŭ siaj malpezetaj, turniĝemaj knabinoj, ordonante al ili levi iom la maldekstran ŝultron kaj sin teni pli rekte; pli mallonge dirante — ĉi tempe Nevski-prospekto estas la pedadogia Nevski-prospekto. Sed ju pli proksimas la dua horo, des pli malgrandiĝas la nombro de guvernistinoj, pedagoj kaj infanoj: ili, fine, estas anstataŭataj de sentemaj iliaj patroj, marŝantaj brako ĉe brako kun siaj diverskoloraj, nervecaj amikinoj. Iom post iom aligas al ilia societo ĉiuj, finintaj sufiĉe gravajn hejm-okupojn, nome: priparolintaj kun sia kuracisto pri vetero kaj pri malgranda akno, aperinta sur la nazo, eksciintaj pri sanstato de ĉevaloj kaj infanoj siaj, cetere evidentigantaj grandajn talentojn, tralegintajn afiŝon aŭ gravan artikolon en ĵurnalo pri alveturantoj kaj forveturantoj, fine, trinkintaj tason da kafo aŭ teo; ilin aliĝas ankaŭ ili, kiujn enviinda sorto donacis per bena titolo de oficistoj por apartaj komisioj. Ilin aliĝas ankaŭ tiuj, kiuj oficas en eksterlanda kolegio kaj distingiĝas per nobleco de siaj okupoj kaj kutimoj...

...Dum tiu ĉi benata tempo inter la 2-a kaj 3-a posttagmeze, kiu povas nomiĝi moviĝanta metropolo de Nevski-prospekto, okazas la ĉefa ekspozicio de ĉiuj plej bonaj verkoj de homo. Unu montras dandan surtuton kun la plej bona kastoraĵo, aliu — grekan belan nazon, la tria — belegajn vangharojn, la kvara — paron da beletaj okuloj kaj mirindan ĉapelon, la kvina — ringon kun talismano sur la dandeca malgranda fingro, la sesa — piedon en ĉarmanta ŝuo, la sepa — koltukon admirigan, la oka — lipharojn mirigajn. Sed batas la tria horo — kaj la ekspozicio finas, la amaso maldensiĝas... Je la tria horo nova ŝanĝo. Sur Nevski-prospekto subite aperas printempo: ĝi pleniĝas la tuta je oficistoj en verdkoloraj vic-uniformoj. Malsataj titol-, korteg- kaj ceteraj konsilantoj per ĉiuj fortoj penas plirapidigi sian marŝon. Junaj kolegi-registrantoj, guberni- kaj kolegi-sekretarioj rapidas utiligi ankoraŭ la tempon kaj tramarŝi kun sinteno, montranta ke ili tute ne sidis dum ses horoj en la oficejo...

...De la kvara horo Nevski-prospekto estas malplena, kaj malŝajne estas, ĉu vi renkontos sur ĝi almenaŭ unu oficiston. Iu kudristino el magazeno trakuras Nevski-prospekton kun skatolo en la manoj;... iu alvena strangulo, por kiu ĉiuj horoj estas egalaj; iu longa, altkreska anglino kun mansaketo kaj libro en la manoj;... iufoje malalta metiisto, kaj plu neniun vi renkontos ĉi tempe sur Nevski-prospekto.

Sed ĵus la krepusko estas falinta sur domojn kaj stratojn, kaj la gardisto, kovrinte sin per bastomato, surrampas ŝtuparon por lumigi lanternon, kaj el la malaltaj fenestroj de magazenoj ekrigardos tiuj estampoj, kiuj ne kuraĝas sin montri dumtage, Nevski-prospekto denove revigliĝas kaj komencas movetiĝi. Tiam alvenas tiu mistera tempo, kiam lampoj donas al ĉio iun logantan, mirindan lumon. Vi renkontos tre multajn junajn homojn, en varmaj surtutoj kaj peltoj. Tiutempe estas sentata iu celo, aŭ pli bone, io simila al celo, io ekstreme senkonscia; ĉies paŝoj rapidiĝas kaj fariĝas ĝenerale tre malegalaj; longaj ombroj rapidkuras sur muroj kaj pavimo, kaj preskaŭ atingas per la kapoj Policponton. Junaj kolegi-registrantoj, guberni- kaj kolegi-sekretarioj tre longe promenas: sed maljunaj kolegi-registrantoj titol- kaj korteg-konsilantoj plej parte sidas hejme, aŭ ĉar ĉi popolo estas edzeca, aŭ ĉar por ili tre bone preparas manĝaĵojn loĝantaj ĉe ili hejme kuiristinoj-germaninoj. Tie ĉi vi renkontos respektindajn maljunulojn, kiuj kun tia gravo kaj kun tia mirinda noblo promenas je la dua horo tra Nevski-prospekto. Vi vidos ilin kurantaj same, kiel junaj kolegi-registrantoj por ekrigardi sub la ĉapelon de elmalproksime rimarkita sinjorino, kies dikaj lipoj kaj vangoj, stukitaj per ruĝpomado, tiel plaĉas al multaj promenantoj kaj pleje al komercistoj, ĉiam, en germanaj surtutoj, promenantaj amase kaj ordinare brako ĉe brako...

El la rusa tradukis GED.

PETERBURGO 1905

PROLOGO EL LA ROMANO « PETERBURGO »

ANDREO BELYJ

Viaj ekscelencoj, moŝtoj, sinjoroj, civitanoj!

. . . .

Kio estas Rusa Imperio nia?

Rusa Imperio nia estas geografia unuaĵo, kio signifas: parto de certa planedo. Kaj Rusa Imperio entenas: unue — Grandan, Malgrandan, Blankan kaj Ruĝan Rusion; due — Kartvelan, Polan, Kazanan kaj Astraĥanan reĝolandon; trie, ĝi enhavas... Sed — cetera, cetera, cetera.

Rusa Imperio nia konsistas el multego da urboj: metropolaj, guberniaj, distriktaj, ekstervicaj, kaj plue: — el la unuatrona urbo kaj la patrino de la urboj rusaj.

La urbo unuatrona estas Moskvo; kaj la patrino de la urboj rusaj estas Kievo.

Peterburgo, aŭ Sankt-Peterburgo, aŭ Piter (kio estas la samo) efektive



apartenas al Rusa Imperio. Kaj Cargrado (Reĝurbo), Konstantinogrado (aŭ, kiel oni diras, Konstantinoplo) apartenas laŭ la rajto de heredo. Sed pri ĝi ni ne parolos vaste.

Pli vaste ni parolu pri Peterburgo: estas — Peterburgo, aŭ Sankt-Peterburgo, aŭ Piter (kio estas la samo). Sur bazo de la samaj opinioj, Nevskij-Prospekto estas Peterburga Prospekto.

Nevskij-Prospekto posedas mirindan econ: ĝi konsistas el spaco por cirkulado de la publiko; numeritaj domoj limigas ĝin; la numeraro estas laŭ vico de la domoj, — tial serĉado de bezonata domo estas tre faciligata. Nevskij-Prospekto, samkiel ankaŭ ĉia prospekto, estas publika prospekto, tio estas: prospekto por cirkulado de la publiko (ne de aero, ekzemple); la formantajn ĝiajn flankajn limojn domoj estas — hm... jes... por la publiko. Nevskij-Prospekto vespere estas lumigata per elektro. Sed tage Nevski-Prospekto ne bezonas lumigon.

Nevskij-Prospekto estas rektlinia (parolante inter ni), ĉar ĝi estas eŭropa prospekto; kaj ĉiu eŭropa prospekto estas ne simpla prospekto, sed (kiel ni jam diris) prospekto eŭropa, ĉar... jes... Ĉar Nevskij-Prospekto estas rektlinia prospekto.


Nevskij-Prospekto estas ne malgrava prospekto en tiu ĉi ne rusa — metropola — urbo. Ceteraj rusaj urboj prezentas el si lignan amason da dometoj.

Kaj mirinde de ĉiuj ili diferenciĝas Peterburgo.

Tamen se vi daŭrigas aserti la plej malspritan legendon — ekziston de la unu-kaj-duonmiliona Moskva loĝantaro, — tiam oni estas devigata konsenti, — ke ĉefurbo estu Moskvo, ĉar nur en ĉefurboj povas esti unu-kaj-duonmiliona loĝantaro; sed en la urboj guberniaj nenia unu-kaj-duon-miliona loĝantaro estas, estis, estos. Kaj konforme al la malsprita legendo evidentiĝos, ke la ĉefurbo ne estas Peterburgo.

Sed se Peterburgo ne estas ĉefurbo, tiam ne ekzistas Peterburgo. Ja nur ŝajnas, ke ĝi ekzistas.

Ĉiel ajn, Peterburgo ne nur ŝajnas al ni, sed eĉ montriĝas — sur la



landkartoj: en aspekto de du unu en la alia sidantaj rondetoj kun nigra punkto en la centro; kaj el tiu ĉi jen matematika punkto, ne havante mezureblon, deklaras ĝi energie pri tio, ke ĝi ekzistas: el tie, el tiu ĉi jen punkto fluas torente maso da presita libraro; flugas el tiu ĉi nevidebla punkto rapidege cirkulero.

. . . .

Peterburgon ĉirkaŭas ringo da multtubaj uzinoj.

Multmila homamaso trenas sin al ili ĉiumatene; kaj klopode svarmas la antaŭurbo; kaj bruas la popolo. Ĉiuj uzinoj maltrankvilis tiam tre multe; kaj la laboristoj-reprezentantoj de la amasoj transformiĝis ĉiuj ĝis la lasta je multparoladaj subjektoj; inter ili cirkulis broŭningo, kaj ankoraŭ io. Tie la ordinaraj homamasoj en tiuj ĉi tagoj kreskis supernorme kaj kuniĝis unuj kun la aliaj en multkapan, multvoĉan, grandegan nigraĵon; kaj la fabrika inspektoro kaptis tiam la telefontubeton: kiam iufoje li kaptas la tubeton, tiam certe — ŝtona hajlo flugas el la homamaso en la fenestrovitrojn.

Tiu tumulto, ĉirkaŭinta ringe Peterburgon, penetris iel ankaŭ en la peterburgajn centrojn mem, konkiris unue la insulojn, transiris Litejnij kaj Nikolájevskij pontojn; kaj de tie ĝi ekfluegis sur Nevskij-Prospekton: kaj kvankam sur Nevskij-Prospekto estis sama la cirkulado de la homa multpiedaĵo, tamen la konsisto de la multpiedaĵo ŝanĝiĝis rimarkinde; sperta rigardo de observanto jam delonge distingis aperon de nigra ĉapo vila, surfruntigita, alveturigita ĉi tien de sur la kampoj sangigitaj de Manĝurio: tio sur Nevskij-Prospekto ekpaŝis la multparolada subjekto, kaj pli malaltiĝis subite la procento de preterpasantaj cilindroĉapeloj; la multparolada subjekto manifestis tie ĉi sian veran esencon: ĝi skuis la ŝultrojn, enmanikiginte la fingrojn de la frostiĝintaj manoj; aperis ankaŭ sur Nevskij maltrankvilaj ekkrioj de la kontraŭregistaraj buboj, kuregantaj plenspire de la stacidomo al la Admiralejo kaj svingantaj ruĝkolorajn ĵurnaletojn.

En ĉio cetera mankis ŝanĝoj; nur unufoje — Nevskij-Prospekton flukovris homamasoj akompanataj de pastraro: oni portis sur brakoj unu profe-

soran ĉerkon, direktante sin al la stacidomo, kaj antaŭe estis fluanta maro da verdaĵo: flirtis sangkoloraj atlasrubandoj.

La tagoj estis nebulecaj, strangaj: estis forpasanta frostospire la venenplena oktobro; glaciiĝinta polvo flugis tra la urbo bıunventege; kaj humile ekkuŝis sur la vojetoj de Somer-ĝardeno (Letuij-Sad) la ora murmurado folia, kaj humile estis kuŝiĝanta ĉe la piedoj la susuranta skarlataĵo por volviĝi kaj ŝoviĝi ĉe la piedoj de preterpasanta vojiranto, kaj por flustreti, plektante el la folioj flavruĝajn ŝutaĵojn de vortoj; tiu dolĉa parua pepado, kiu banis sin tutan aŭguston en foliarondo, jam delonge en foliarondo ne banis sin plu: kaj la paruo mem de la Somer-ĝardeno nun orfece saltetis en nigra reto de branĉoj, sur bronza barilo kaj sur tegmento de la Petra dometo.

Tiaj estis la tagoj. Kaj la noktoj — ĉu vi estis eliranta nokte, ĉu vi estis foriranta al malplenaj, eksterurbaj kampoj por aŭdi la trudeman, malbonan noton je «u»? Uuuu-uuuu-uuuu: tiel sonis en la spaco; la sono — ĉu ĝi estis sono? Se tio eĉ estis sono, ĝi estis sendube sono de iu alia mondo; tiu ĉi sono estis atinganta eksterordinaran forton kaj klarecon: «uuuu-uuuu-uuuu» sonis nelaŭte en la apudurbaj kampoj de Moskvo, Peterburgo, Saratovo: sed la fabrika sireno ne muĝis, vento mankis; kaj silentis la hundo.

Ĉu aŭdis ankaŭ vi la oktobran tiun ĉi kanton de la jaro mil naŭcent kvina? Tiu ĉi kanto ne estis antaŭe; tiu ĉi kanto ne estos: neniam...

El rusa lingvo tradukis N. NEVEIN.

RIBELO

V. ALEKSANDROVSKIJ

I.

Tim' en okul'.
Flugimpulsemaj rigardoj.
Kreskas mister'.
Iras giganto sur ter'.
Nigraj jakaĉoj, ponardoj
Naĝas en fum' siluete.
Enpoŝigitaj la manoj —
Sekrete.
En la angul' —
Brul'.
Sonoj naskiĝas ĉikanaj.
Tie sur stratoj deklivaj
Nigri-tendenc'.
Domaj okuloj — senvivaj.
Ankaŭ fermita — la buŝ'.
Sed!... Homa kunpuŝ'.
Estas komenc'!...
Tremis la vok' en aero:
— Fratoj!... Fratoj!...
Grinco netakta de fero,
Krioj kaj batoj...

Kreskas mister' en grotesk'.
Nuboj purpuras.
Venas Grandego, maturas
Dum kresk'.

Pafoj sonoraj, brusonaj.
Vitroj ektintis sur trotuar'.
Pulva odoro.

Ĝemoj admonaj.
Akra kriado. Flamar'.
La sufokata pasinto stertoras.
Mort' al ĝi! Mort'!
Stratoj per muĝo pleniĝis,
Tempoj finiĝis, —
Flagras perfort'.

II.

La vorto malbena —
Perfido, —
Grimacis ĉirkaŭe kun vent',
Kaj ŝaŭmis l'anim' en decido
Ataka.
Fiksiĝis venena
Okul' al okul',
Atendis :
Eksplodos tuj fulm' el nebul'
Kaj tondrotorent'
El vic' nin forigos kaphaka.
Kun kia forteg' sin etendus
La manoj kolere
Al gorĝo de krima spiono!
Cerbumis.
Serĉsendis,
Sub pez' de sufero
Kun glav' en arog'.
Kaj jen
El post nigra kolono
Okuloj hellumis
Kaj brilis kaj plendis
Mensog'
Kaj malben'
En ili.
Sin ĵetis
Mandeko al krim',
Kaj fingroj kuniĝis premile,
Kaj tuj jam kvietis
Kadavr' sur pavim'.

Kaŝiĝis nebule fantom'.
Lacege susuris la plandoj...
Post ili restinta la dom'
Ekflagris per ruĝaj rubandoj.

III.

Senkompata — mortfalĉil',
Sub radioj helotorĉaj
Tra dolorturmentoj sorĉaj
Koroj flamis en rebril'.
En nebula grizprofundo,
Kun freŝvundo
Bandaĝita malzorgeme,
Staras laborist' ĉe pordo,
Akraŭskultas kun arbitr'.
Ree estas la batal'
Nun.
Kaj tre ĝeme
Sonas la aerakordo.
En la beletaĝ' al vitr'
Algluiĝis ies kapo ;
Sango fluas sen imun'.
En subit' ekgrincis dentoj
Kiel fer' kunpuŝe rusta,
La rigard' — en venĝflamad'.
Ondo skrapa
Dum momentoj
Jen mallaŭta, jen plenbrusta
Vokincitis
Al defend' de l' barikad'.
Kaj la korpo sangkovrita
Nun risorte
Flugis ree al nebul' —
Ĉenoj deŝiriĝis ŝtalaj
De l' titano — juna forto.
Tiranul'
Laŭ deca pun'.
Mortis nun.

Oroflua,
Flamobrua
Domojn lekis la serpent'
Ombro flugis noktenua
De l' orient'.

IV.

Sulkis vizaĝon
Vesper', — kaj en fendoj

Kreskis denove viviĝo.
Frosto kuraĝon
En korpon negliĝan
Akre etendis
Pingle.
Ĉiam mistere
Pretere, pretere
Vigle
La plumbo traflugis
Rustis fermil'
Sub la pluva kupol'.
Nubon traplugis
La maltrankvil'
De la homa parol'.
Brulis en centro.
Subite kun pen'
Pulsis la koro :
— Jen ! Jen ! —
Kaj laŭ moro
Akcelis pafilojn la ĉen'.
Atendis.
Timplendis.
Jen ? Jen ?
Kaj la ven'
De la vizi'
Takte sonoris per paŝoj.
Pro la sinkaŝo
Estis kraĉita diablo kaj di'.
Koron suĉadis dolora vampir',
Skurĝis la vent' en ating' :
— Signaldir' !?
— « La ring' ! »
— Diablo vin prenu !... Ni timis.
Ŝanĝo.

Iris patrol' malproksimen.
Eĥis pavimo.
Murojn kuglar' malaranĝis.

V.

Tagiĝ'.
Ombrar' transformiĝas en homojn,
Rigardas okul' kun prestiĝ' :
Jam certa kaj tre aksioma
Fariĝ'.
Festenas Batalo en pret'.
Prenita el ujo
Signala trumpet'
Ekkantis ĉe la kontraŭulo.
Kaj sible kaj tuje
La kugloj flugcelis
Nebule.
Abele
Ekzumis popolo.
La manoj sin streĉe etendis
Muskoloj.
Supren la sanga standard'.
Atendis :
Daŭras la gard' ?
Ĉu
Sen ŝancel' ?
Nun per fronto disvolva
Fratoj al cel' !
Venku nun plu !
Detruos ni polvan
Mondaĉon,
Post batalo-pasi'
Ni pri ni
Restigos memoron kaj plaĉon.

Jam venko. Frakas'.
Tra fumo nebula kaj ombra
Radias la sun' al amas',
Ĝojhimnas l' amaso sennombra.

VI.

Standardoj. Plakatoj.
Devizoj per vent' naskiĝantaj.
— Potenc' al Sovetoj !
— For oportunistojn !
Himnoj. Orkestroj. Kantatoj.
Sunon amantaj
Vivoskulptistoj, —
Ruĝaj por ili lumetoj —
Ebri'.
Flugas aere la kantoj
Kuraĝaj.
Ili — esprim' de ĝojstri'.
Fias la kantoj-gigantoj
Stratojn malvastajn.
Ĝojo, grandega ĝojeg' sur vizaĝoj,—
Fest de labor'.


Pendas skarlata
Flag' sur domar'.
Manoj salutas impone.
Vico soldata
Ĝojas sen bar'.
Ruĝas arkaĵo, —
Ja oni
Florigis ĝin.
Ardis kolera sovaĝo, —
Estingis ĝin
Ĝojo sur stratoj
De luktantar'.

Flirtas standardoj, plakatoj,
Himnoj el suna vortar'.

Julio 1918. *Trad. Majo 1920.*

El la rusa tradukis G. *ROZENBLAT* (†).





MALNOVA PETERBURGO

KAJ

NOVA LENINGRADO

V. ĤOLODKOVSKI

Bruante kaj ekbrilante per bluaj fulmetoj, rampas sonoranta tramo sur potencan kaj rektan ponton ĵetitan trans la bela Neva-rivero.

Jen tie ĉi — sur tiu ĉi placo, apud tiu ĉi ora katedralpivoto kaj granitaj citadelmuroj, proksime de tiu balkono, de sur kiu en 214-a jaro post naskiĝo de l' urbo estis parolanta antaŭ grandegaj masoj da laboristoj kaj soldatoj la gvidinto de la revolucio proletaria Vladimir Iljiĉ Lenin, — jen tie ĉi ĝuste troviĝas la lulejo de Sankt-Peterburgo — Petropolo — Piter — Petrogrado — nun Leningrado.

Tie ĉi la caro Petro, venkinte la svedojn ĉe Nienŝanco (kie nun estas Oĥta), decidis konstrui sur Lepor-insulo (Zájaĉij-Ostrov) « novan kaj tre bonan fortikaĵon », kaj sur la najbara Betul-insulo (Berézovyj-Ostrov) « difinis ke estu urbo ».

20.000 « subfosistoj » — militkaptitaj svedoj kaj elpelitaj el Rusio kamparanoj kaj indiĝenoj — laboregis super konstruado de Petropaŭla citadelo, la devigatoj — por nura nutrado, kaj la liberuloj — por nutrado kaj pago: 3 kopekoj pro tagnokto. Terfosiloj mankis, kaj tiam la teron oni fosis per manoj kaj fosaĵon portis en baskoj de vestoj.

Al la minaca citadelo neniam okazis plenumi sian rektan difinon — rebati per fajro malamikon. Sed tre baldaŭ ĝi fariĝis tio, kio ĝi estis ĝis la revolucio mem, — malliberejo. Jam en 1718 la kazematoj de l' citadelo, servintaj komence kiel deponejoj por komercaĵoj, pleniĝis per politikaj krimuloj, partianoj de la carido Alekseo, kaj baldaŭ poste eĉ mem Alekseo estis ĵetita en « Trubeckój raskát ».



De post tiam la citadelo estis vidinta multajn enkarcerigatojn : decembristoj (unuaj ribelintoj en 1825 kontraŭ la cara absolutismo por demokratia konstitucio), popolvolanoj (membroj de la unua socialista partio) — tutaj generacioj de rusaj revoluciuloj estis maljuniĝantaj, freneziĝantaj, mortantaj en la kazematoj... Kaj je mil paŝoj de ili, sub majestaj arkaĵoj de Petropaŭla reĝa kripto, unu post la alia estis enterigataj iliaj kronitaj malamikoj.

La pasinteco, malbenita pasinteco de la Petropaŭla citadelo mortis por ĉiam... Sur la muska katarina bastiono staras 11 malnovmodaj kanonoj, kaj 11 rusaj caroj kaj carinoj putras en marmoraj sarkofagoj sub planko de la katedralo... Kaj ankoraŭ dormetas en malnova, konstruita de Zemcov paviliono « avo de la rusa ŝiparo » — boato de Petro I kun ludilaj kanonoj sur randoj. Jen estas ĉio...

La nuntempa Petropaŭla citadelo vivas nun per ruĝarmea vivo. Sur la korto, proksime de la « danca » placo, kie iam « dancis » pro doloro kulpiĝintaj soldatoj, dum oni sidigis ilin sur lignan akradorsan ĉevalon aŭ starigis sur kolonon kun akraj pinglegoj, — tie nun viciĝas en regulaj vicoj la ruĝarmeanoj en stelaj ĉapoj.

Vento taŭzas sur la citadelo ruĝan flagon de la revolucio. Kaj kiel antaŭe, vivas per labora brua vivo la Mon-Korto, ĉizanta la sonoran sovetan oron.

Kaj renkonte al la Petropaŭla katedralpivoto pikanta la palblankan vaton de la ĉieloj elkreskas sur alia bordo la alia historia, kantita de Puŝkin, « admirala pinto ».

De ĝi diskuras radie tri « perspektivaj vojoj », tri geometriaj linioj, kovritaj poste per ŝtono kaj ŝtoniĝintaj kiel tri prospektoj.

Ĝuste tie ĉi, sed ne ĉirkaŭ la citadelo kaj ne sur Brazil-insulo (Vasiljevskij-Ostrov), tiu ĉi malsukcesinta « Amsterdamo », tie ĉi ĝuste, sur maldekstra bordo de Nevá-rivero, ĉirkaŭ la admiralejo konstruita de genio Zaĥarov, estis destinita formiĝo de centro de l' estonta urbo kaj de l'estonta Rusia Imperio.

Tie ĉi, sur teritorio de nur kelkaj kvartaloj, estis ordonanta kaj estis mortanta la rusia absolutismo. Tie ĉi kreskis palacoj kaj ministrejoj, de tie ĉi plukreskis kaj plukonstruiĝis la urbo — komence ĝis Mojka, poste ĝis Fontanka, ĉiam plue, ĉiam pli larĝe, ĝis ĝi ĉirkaŭiĝis per nigraj fabrikaj

antaŭurboj. De tie ĉi minacis al la lando Peterburgo, minacis la imperio, ĝis la ekscititaj antaŭurboj ekmontris bajonetaron.

Lastafoje la registara pulso de la lando ektremis kaj eksilentis en la Vintra palaco de Rastrelli dum la oktobra nokto... Poste la ordonanta spirito forflugis et tiuj ĉi lokoj — la vivpulso alilokiĝis en aliajn regionojn, loĝatajn de stabloj kaj tubegoj.

Kaj la administra cerbo de l' urbo, la nerva nodo de ĝia revolucia volo foriris — trans la tuta urbo — al malnova antikve severa konstruaĵo, kiun konstruis la nekomparebla Guarengi.

Tiu ĉi konstruaĵo servis antaŭe por celoj tre pacaj kaj tre bonmoraj: Smolnyj Institut' — « instituto por nobelaj fraŭlinoj », instituto de sinjoridinoj posedintaj privilegion havi patreton kun rango ne pli malsupera ol tiu de la efektiva ŝtatkonsilanto.

Tie ĉi oni instruis « po iomete, pri io ajn kaj iel ajn » — kaj la enuaj tagoj de tia « muslina » instruado estis alterniĝantaj kun baloj kaj vizitoj de la « plejaŭgustaj » gastoj.

Kiu memoras nun pri la antaŭaj loĝantinoj de Smolnyj? Ŝajnas, ke lastafoje la historio rememorigis pri ili en iu antaŭ-Oktobra kunsido de Petrograda Soveto, kiam iu spritema bolŝeviko moke komparis kun « smolnyjaninoj » la menŝevikojn afektintajn dum apogeo de la plej granda revolucio.

Sed jen jam estas nek postesigno, nek memoro pri la antaŭa Smolnyj. De post tiu tempo, kiam la voĉo de Lenin eksonis en la malnovaj muroj de Guarengi, — en la senfinaj koridoroj, en la sennombraj ĉambroj loĝas aliaj homoj, sonoras aliaj paroloj. El tie ĉi — el inter la muroj de l' antaŭa monaĥinejo de anemiaj fraŭlinoj — la ŝtala mano laborista regas Leningradon kaj la tutan industrion de landregiono ĉirkaŭanta ĝin.

Kaj jen estas alia historia ironio kun preskaŭ renversa senco: la palaco je la nomo de Urickij.

Jam ĝin pro amaj kaj aliaj « virtoj » konstruis por princo Potemkin Katarino II. Pli poste Paŭlo I, malameginta Potemkin-on, aranĝis en la Taŭrida palaco plenan detruon: eĉ la parkeda planko estis transportita de tie ĉi al Miĥael-kastelo (Miĥájlovskij-Zámok) kaj la palaco mem estis prezentita por kavaleriaj kazernoj — kaj nur Aleksandro I forigis el la maneĝigita kaj plenigita per sterko palaco siajn lejb-husarojn.

En 1905 oni decidis la palacon prezenti por la unua rusa parlamento — Gosudárstvennaja Duma, kaj interalie dum remonto la peza majesta arkitekturo de Starov estis multe difektita.

En tiu sama halo, kie iam dum fabele luksa balo de Potemkin tondris la patriota « Ĝoju, brava Rusian'! » — tie ekfluis kiel senfina babilado la tagoj de rusia konstituciismo.

La februaro 1917 por mallonga tempo faris la Taŭridan palacon centro de la disvolviĝantaj okazaĵoj: tien ĉi oni venigis la arestitajn, palajn, tremantajn pro timo carajn ministrojn.

Tiu periodo de la « babilaĉa registaro » rapide finiĝis — kaj nuntempe tien ĉi, kie antaŭe maljunaj parlamentaj parolaĉuloj penetis fari historion de Rusio, venis aliaj junaj kaj obstinaj homoj, ne por paroli, sed por lerni kaj por fari. La antaŭa tutruslanda parolaĉejo fariĝis Komunista universitato, kulturejo de difinita kaj klara Lenina penso. Kaj en la granda historia halo

okazas nun aliaj festoj kaj aliaj kongresoj, kiujn sonĝis nek la « princo Taŭrida », nek la rusiaj parlamentistoj.

La malnova Peterburgo mortis...

Jam delonge tiriĝis ĝia formortado, ĝi komenciĝis jam en la pasinta jarcento, de post naskiĝomomento de la rabista kapitalismo, sed definitive ĝi mortis, kiam ĝi ekestis nomata Ruĝa Piter. Kaj tiam ĝuste embriiĝis sur la lokon de malnovo ankaŭ la juna, plena de neelĉerpeblaj fortoj, estonteco ĝia. Kiam Petrogrado fariĝis Ruĝa Piter, kaj poste Leningrado, ĝi transformiĝis en urbon de laborista diktaturo — kaj nova neordinara vizaĝo komencis reliefiĝi el nebuloj de la glaciiganta detrueco de l' unuaj post-Oktobraj jaroj. Ne reĝa kaprico, ne verkimago de tutaj generacioj da artistoj — la popolo mem, la proletariaro loĝanta la urbon de l' revolucio, kreas tiun ĉi novan, tiun ĉi Leninan vizaĝon de l' urbo.

De l' admirindaj placoj kaj granitaj kajoj, de la kvartalo de Kupra Rajdanto (monumento de Petro I) la sango de l' urbo forfluis al la heroaj fulgiĝintaj fabrikaj urbrandoj.

Post Nevskaja-Zastava, en la forgesita ĝis nun Oĥta, komenciĝis nova, grandioza konstruado: Leningrado konstruas domojn por siaj laboristoj.

Novaj stratoj tratranĉas tiujn ĉi regionojn, post la urblimo estas replanigataj tutaj kvartaloj, tie oni plantas ĝardenojn por la laboristoj kaj ĉirkaŭbaras ilin per la famekonata krado de la Vintra palaco (Zimnij-Dvoréc). La malproksima, ĝis nun plej ofendita Oĥta ricevis akvokondukilaron, elektron, tramon.

Frapas hakiloj... Tie la proletarioj de Leningrado konstruas « kulturpalacojn », lernejojn, stadionojn — en Moskvo-Narva, en Viborga regionoj, sur ankoraŭ antaŭnelonge dezerta Malsat-insulo (Golodáj). Sur Golodáj-insulo jam komencas disvolviĝi tuta urbo — sed ĝi estas jam ne « Nova Peterburgo », sed « Nova Leningrado ».

Golodaj-insulo havas grandan estontecon. Ĝi eniĝos kiel videbla ĉenero en la sistemon de la « Estonta Leningrado », Leningrado, defendota de la superakviĝoj, drenonta siajn marĉojn, utiligonta siajn marbordojn, sanigonta la aeron kaj grundon kaj kreonta apud si multajn kilometrojn da saniga marbanplaco kaj grandan kvanton da laboristaj kuraclokoj.

El « Ekran » trad. VOLDEMARO.



PETERBURGO

(FRAGMENTO)

R. IVNEV

Fantomo, fantomo, leviĝinta el verdaj nebuloj, el finnaj marĉoj! Fantomo, fantomo karniĝinta! La tero tremas, kvazaŭ pro paŝegado de gigantoj. Ho, Peterburgo, via suno supreniros!...

Jen el nebulo stelo muta aperis — urbo muta aperis. Rigardu la brilon lazuran. Ho, mia Nevá-rivero, la blua, via aspekto estas signita de la destino. Venis via jaro — mirinda kaj malkvieta...

Jen tie brusonas, kvazaŭ kupro, la popolamaso. En muskoloj de la fortikaj brakoj naskiĝas la viva suno. La ĉielrando estas rozkolora, kvazaŭ vundo. Ĝi flamas, kvazaŭ ĝi scias la tutan turmentoĉagrenon de la pereintoj pro la sankta afero...

La Kupra Rajdanto super la nigra Nevá-rivero tage kaj nokte, nokte kaj tage dancas kaj dancas kvazaŭ arbara fajro. Super lia peza kapo nigra ombro ŝoviĝas kaj svingas per nigraj flugiloj...

Peterburgo, lunfantomo de verdaj marĉoj kaj akvoj, vi brulu, brulu en la universo! Delikataj kordoj de via ora stelo brulas en nia konscio.

Mi aŭdis bruegon. Estis ruiniĝantaj la tronoj sub himno de la tuthomaro, himno de l' internacio... La amaso kriis...

Kaj tie, kie Petro, larĝe ekspirinte, diris: — Jen estas ĝi, mia urbo nova! — kie aperis el marĉoj lia unua domo, — tie, konvulsie alpreminte sin al ŝtalkrado, staris alia gvidinto.


— Pri frateco, pri la frateco de ĉiuj humiligitoj, pri la frateco de ĉiuj turmentigitoj, pri la frateco de la kadukigitaj homaj! Militon — al la palacoj, pacon — al la kabanoj! Super tutmonda imperio kolektiĝis malhelaj nubegoj. Pluvo el radioj, el fajraj radioj!

Ho, pluvo bolanta kaj ribela, super la homamaso flugu, furioza, pasia, dolĉa, kiel nedishakebla ondo!

Ho pluvo bolanta kaj sorĉa, la tutan termondon ŝanĝu, estu por ni akvo, kuracakvo...

Ho, pluvo bolanta, pluvo de l' Oriento, tondru super la lando, flugu, flugu, kiel larĝa ondo super la tuta tersurfaco...

El la rusa trad. N. V.



LENINGRADO

I. E.

Memorinde — oktobre, aŭtune
Ne ekscitiĝis pro plumba pafad'.
Pro revenĝo ni tremis kune,
Leningrad' !

El « Aŭroro » (1) kuglegon ni celis
Al la Vintra palaco-fasad'.
Ni per ĝi la malnovon sigelis,
Leningrad' !

Devos iam ni ree ripeti
Tiujn tagojn en iu dat'.
Multo restas ankoraŭ fareti,
Leningrad' !

(El laboristaj poeziajoj.) *Elrusigis* *N. VLADIMIROVIĈ.*

---

(1) *En oktobro 1917 la krozŝipo « Aŭroro » bombardis Vintran palacon — rezidencon de la Provizora registaro. Per tio estis deklarita la Oktobra renverso.*

ESTONTECO DE LENINGRADO

G. CIPEROVIĈ

Ruĝa Leningrado estas lulejo de la plej granda en la mondo proletaria revolucio. Ruĝa Leningrado tial ĝis nun estas batal-standardo de la proletarioj ne nur de Soveta Rusio, sed ankaŭ de la tuta mondo.

Malgraŭ ke tiu ĉi granda urbo perdis sian politikan signifon kiel unua ĉefurbo kaj ekonomie estas tre subfosita, la malamikoj de Sovet-Rusio, same kiel antaŭe, celas ĝin ĉiufoje, kiam temas pri iu vica atenco kontraŭ la libereco de la tuta lando. Ili bone konsideras ĝian grandegan revolucian gravecon en la internacia klasbatalo, ili bone komprenas, ke ekfrapo kontraŭ Leningrado estas ekfrapo kontraŭ la ideo de la proletaria diktaturo, kie ajn ĝi aperu aŭ realiĝu en la vivo.

La malfeliĉoj de Leningrado estas priskribataj en la eksterlanda blankula kaj burĝa gazetaro kun eksterordinara ĝuo, kiu elmontras la veran naturon de la « savantoj » de Sovet-Rusio. Por duobligi ilin la internacia burĝaro ŝparas nek fortojn, nek rimedojn. Ruĝa Leningrado estas revolucia splitaĵo en la sentema korpo de la blankuloj ; kaj en siaj senĉesaj provoj eltiri ĝin la malamikoj de la sovet-ordo larĝe malfermas pordetojn de brulrezistaj kasoj por ĉiu dungebla plumrabisto, por ĉiu mortigisto kaj ekzekutisto, por ĉiu aventuristo sendiference, al kiu speco li apartenas, per kiu masko li sin ŝirmas.

Ĝis nun Leningrado estas ne nur celtabulo por la internacia kapitalo, sed ankaŭ barometro, laŭ kiu la burĝaro tutmonda juĝas pri la humoroj en Sovet-Rusio.

Antaŭ ĉiú interveno de la blankaj armeoj kaj bandoj en ĝiajn limojn, antaŭ ĉiu provo helpi al la interveno per artifike preparita eksplodo elinterne, en la blanka gazetaro nepre estis lokataj kaj eĉ nun daŭras aperadi antaŭ ĉio informoj pri « malordoj », « tumultoj », « demonstracioj », « ĝeneralstrikoj », « atencoj kontraŭ eminentaj komunistoj », kvazaŭ okazintaj en Leningrado. Preskaŭ ĉiam « antaŭtempaj » aŭ simple elpensitaj, tiuj ĉi informoj montris plene la opinion de l' internacia burĝaro pri Leningrado, kiel pri aktiva revolucia forto kapabla per sia radiado tremigi la tutan mondon. Pruvi en la momento de l' interveno, ke Leningrado cedis, malantaŭeniris, ne evidentiĝis sur sia posteno, signifis plifortigi la intervenon, rompi inter la proletariaj masoj de la tuta mondo la fidon al la revolucia rezistkapablo de Sovet-Rusio. Tia rezulto, kompreneble, ĉiam valorus la maron da furioza kalumniado, kiu estis kaj estas disfluigata de la dungitaj skribulaĉoj de la burĝa blanka gazetaro, kaj ankaŭ tiun oron, per kiu tiuj ĉi skribulaĉoj estas rekompencataj pro sia kutimiĝinta laboro egale kun la aventuristoj ĉiuspecaj.

Tial nenio mirinda estas en tio, ke la estonteco de Leningrado profunde maltrankviligas la tutan mondon. De la amikoj de la klaso laborista kaj de tiu mem ĉiu simptomo de la renaskiĝo de Leningrado estas akceptata kun

ĝojo, kiel pruvo de tio, ke la proletario kapablas ne nur preni la potencon, sed ankaŭ konservi ĝin per organizado de l' ekonomia vivo sur novaj bazoj. En la tendaro de la burĝaro, male, oni diligente kalkulas ĉiujn simptomojn de malriĉiĝo kaj detruiĝo de Leningrado, ĉar por ĝi ili servas kiel pruvo pri nekapableco de la klaso laborista konservi la politikan potencon en siaj manoj. Dum la tutaj preskaŭ kvin jaroj de la ekzistado de Sovet-Rusio (*) en la burĝa gazetaro estis dirita neniu vorto pri tio, ĉu estas io ajn farita de la klaso laborista por konservo kaj renaskigo de Leningrado.

Pruvi sur bazo de objektivaj faktaĵoj, ke Leningrado havas estontecon, ke estas jam kontante sufiĉaj premisoj de ĝia renaskiĝo, ke energiaj provoj tiudirekte jam estas farataj — tio signifas pruvi, ke la proletaria diktaturo estas vivkapabla ne nur politike, sed ankaŭ ekonomie...

Leningrado estas grandega komplika mekanismo, en kiu difekto de unu rado aŭ ŝraŭbo neeviteble elvokas difekton kaj haltigon de aliaj partoj. Leningrado suferis tri evakuadojn (pro antaŭenirado de la germana armeo al Pskovo, unua kaj dua antaŭeniradoj de Judeniĉ), ĉiufoje perdante valoregan muntaĵon, fabrikaĵojn, materialojn; ĉiu evakuado estis akompanata de masfugado de la burĝoj, kiuj, revante pri veno de la ĝeneralo Judeniĉ kun « blanka bulko » por la burĝaro en unu mano kaj kun maŝo por la laboristaro en la alia, ĉiuokaze ne volis esti « en la luktopunkto » kaj bonrezone tenis « neŭtralecon » pli malproksime, en pli trankvilaj lokoj. Tiu ĉi perdo el la morala flanko ne estis malprofita por Leningrado. Male, se al ĝi prosperis forbati ĉiujn atakojn, tio okazis ĝuste ĉar en ĝi restis ĉefe la proletariaj laboraj elementoj, kiuj sole kapablis taksi la rolon de Leningrado por la revolucio kaj organizi ĝian defendon. Sed la granda perdo de la loĝantaro ne povis ne venigi al tio, ke la urbo rapide akceptis dezertan, nezorgatan aspekton. Ĝi fizike suferis pro tiu ĉi malpliiĝo, kaj baldaŭ ĝi devis konsideri tiun fakton, ke ĝia amplekso estas tro neproporcia al la loĝantar-kvanto, t. e. la kontraston, kiu por grandaj urboj ĝenerale neniam senpune pasas. Tamen precipe peze rezultis al Leningrado la foriro de granda kvanto da kvalifikita laborforto kune kun la muntaĵaro de l' tutaj fabrikoj al Uralo, Volgo kaj aliaj lokoj de Sovet-Rusio. Tio estis perdo, kiun Leningrado ĝis nun ne povas rekompenci kaj kiu donis rezulte sufiĉe rimarkeblan malaltiĝon en la nivelo de ĝia kultureco.

Kompreneble, klariĝi la akran malpligrandiĝon de la Leningrada loĝantaro nur per la antaŭenirado de l' germana armeo kaj precipe de Judeniĉ estus neĝuste. Tre konsiderindan parton de ĝi oni devis meti ankaŭ sur la konton de la blokado, kiu sisteme sufokis Petrogadon. Fortranĉita de la tuta mondo el la flanko de la maro kaj samtempe tro malproksime situanta de la produktantaj gubernioj, Leningrado estis destinita al malsata vegetado. Kaj samtempe kaj samkaŭze ĝi ne povis ricevi ankaŭ hejtaĵon por sia industrio. Ju pli la tuta Sovet-Rusio estis entirata en la ringon de la antaŭeniradoj el la flanko de Kolĉak, Denikin, Vrangel, Pilsudski, des pli forte estis kunpremataj la ungegoj de la internacia kapitalo sur la gorĝo de Leningrado. La urbo ŝajnis esti kondamnita al certa pereo.

Jenaj ciferoj montras, kiel la interveno kaj blokado rezultis sur la nivelo de la loĝantaro de Leningrado.

(*) Skribita en 1922.

En 1917 la loĝantaro de Leningrado egalis	(kun antaŭurboj).		2.420.000	homoj.
» 1918 »	» » » » »	.	1.469.000	»
» 1919 »	» » » » »	.	800.000	»
» 1920 » »	(laŭ nombrado 28 aŭgusto)	. . . .	740.229	»
» 1921 » »	(laŭ komputo de Gub. Statistik. Oficejo).		770.000	» (*)

Sed eĉ la restanta loĝantaro ne estis sufiĉe garantiita per provizumo, nek per hejtaĵo. La malsata raciono kaj la malvarma lignonormo faris sian aferon. Inter la restintaj leningradanoj la malsata morto sisteme kolektadis abundan rikolton. Laŭ la ciferoj de Centra Statistika Administrejo (« Laboroj », v. I, k. 3, p. 4), dum la 1-a duono de 1920 en Leningrado por ĉiuj 10.000 loĝantoj okazis 223 naskiĝoj, 895 mortoj; la diferenco — 672. Samtempe en Moskvo por ĉiuj 10.000 loĝantoj okazis 219 naskiĝoj, 468 mortoj; la diferenco — 133. Moskvo, kiel ankaŭ Leningrado, t. e. kiel granda metropola centro, ankaŭ suferis pro pezaj cirkonstancoj, falegintaj sur la tutan Sovet-Rusion; sed ĝi suferis nemezureble malpli, ol Leningrado ĝuste tial, ke la lasta devis akcepti sur sin la pezajn frapojn de la interveno kaj blokado...

. . . .

La psikologio de Leningrado akre ŝanĝiĝis de post kiam Leningrado donis signalon de la proletaria revolucio. El la urbo de carismo, aristokratio kaj supera burĝaro ĝi transformiĝis al klasika urbo de la proletaria diktaturo, urbo de la klaso laborista. Tia ŝanĝo senpage ne okazas. Kaj nun, fortike kaj por ĉiam firmiginte sian novan pozicion, la granda urbo de la revolucio komencas metode, sed insiste efektivigi tiun taskon, kiun la vivo metis antaŭ ĝi. Tra ĝi ekiras la materia ligo inter la tuta okcidenta mondo kaj la tuta Sovet-Rusio. Ĝi staros kiel gardanto sur tiu loko, kie ankoraŭ antaŭnelonge la kapitalistaj landoj de la tuta mondo estis sufokantaj Sovet-Rusion per blokado kaj kie nun necesas manifesti la plej grandan sumon da energio kaj iniciativo por ke la « fenestro al Eŭropo » — Leningrada haveno ne estu fermita denove per ies perfida mano. Leningrado transformos siajn fabrikojn kaj uzinojn en abundajn fontojn de materiaj valoraĵoj por la tuta Sovet-Rusio, ĉar post la proletaria revolucio ne ekzistas por ĝi pli grava kaj pli honora tasko, ol tiu ĉi.

Sed la estonteco de Leningrado tute estos pravigita nur tiam, kiam ĝi sukcesos el la Urbo de la Revolucio transformiĝi en potencan fajrujon de la scienco, kun kies helpo Sovet-Rusio provos eliri sur la larĝan vojon de la vera proletaria kulturo. La urbo de la Revolucio estos urbo de la scienco kaj kono. Ĝi komencos senkompatan lukton sur ĉiuj frontoj kontraŭ la malklereco kaj malprogreso, ĝi deklaros senindulgan militon kontraŭ ĉiuj superstiĉoj kaj eraroj katenantaj la cerbon kaj la koron de la popolamaso, kaj oni povas esti firme certa, ke ankaŭ tiun ĉi kulturrevolucion Leningrado plenumos kun la sama sukceso, kun kiu ĝi siatempe faris la revolucion en la sfero de la sociaj kaj ekonomiaj rilatoj.

(El la libro « Estonteco de Petrogrado ». Ekonomia Skizo. 1922.)

Tradukis el la rusa V. DUNO.

(*) Nuntempe Leningrado rapide rekreskas: jam en 1923 ĝi reatingis 1.000.000 loĝantojn kaj nun en 1926 ĝia loĝantaro kreskas super 1.500.000.

de la krozŝipo « Aŭroro » por forigi tiun marĉon el la surmarĉa urbo, por transdoni ĝin al la manoj, kiuj ĝin konstruis. Necesis la bataloj surstrataj, por ke la pelitoj al laboro ekkonstruu la sociordon de libera laboro. Kaj necesas ankoraŭ multaj penoj por ke Leninurbo de la estonto estu finkonstruita...

La sesa kongreso sennacieca — ni esperu kaj ni zorgu, ke ĝi estu unu el ŝtonoj de tiu estonta Leninurbo — la urbo de tutmonda solidareco laborula, la urbo de libera laboro en la estonta sennacieca mondo.

Al ĝi nia saluto!

La Redakcio.

LIBROJ DE SAT

ELDONA FAKO KOOPERATIVA

	PREZO mk. g
Faŭsto, Gœthe	1.20
Eklumo en Abismo, H. Barbusse (broŝ.)	0.80
Malgranda Terbiblio (Prolet. Atlaso), Szeréni	1.80
Proletaria Kantaro (74 kantoj kun notoj)	3.—
Tri Verkoj de Leo Tolstoj	0.80
El la Mondbildo de l' Nova Fiziko, Murakvin	0.60
La Kemio de la Universo, Fersman	0.60
Sekspsikologio de S. Ziegler	0.60
La Morto de Blanjo, Jean Tousseul	0.60
Ruĝo kaj Blanko de L. Jvn	0.60
La Komunista Manifesto (2-a eldono)	0.60
Dokumentoj de Komunismo	1.—
ABC de Sennaciismo, V. Elsudo	0.50
For la Neŭtralismon! E. Lanty (2-a eldono)	0.25
Kontraŭ Dio! Ateista Krestomatio	0.40
Orienta Blovo	0.40
En Katenoj de la Maljusteco	0.60
Ni Legu! Brunulo. (Internacia Legolibro)	1.—
Petro, kursa lernolibro laŭ parola metodo	0.70

(La prezoj kompreniĝas inkluzive sendkostoj.)

MALKARAJ LIBROJ

Fundamenta Krestomatio de D-ro Zamenhof	2.75
Fundamento de Esperanto (france, angle, germane, ruse, pole)	1.25
Lingvaj Respondoj (92 paĝoj), sur simpla papero	1.50
Sur luksa papero	2.25
Marta, romano (237 paĝoj)	2.—
La Rabistoj (144 paĝoj)	1.20
Vortaro de Esperanto (esp-o - esp-a) de Kabe	2.50

(La prezoj kompreniĝas inkluzive afranko. La livero de libroj, kiujn peras nia librejo, okazas nur kontraŭ antaŭa pago. Rekomendite ni sendas, se oni aldonas 15 % pli al la pago.)

Krom tio ni liveras ĉiujn esp. librojn de aliaj eldonejoj.



Mendu ĉe Administracio de SAT

Richard Lerchner, Leipzig O 27, Colmstrasse 1

Le Gérant: L. GLODEAU. ★ Esperanto-Presejo J. SOLSONA, 9, rue Hallé, Paris-14e